

La kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 701, 1977.03.16 & 18 & 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Antaŭ sia instaligo en la urbo La Chaux-de-Fonds, Kultura Centro Esperantista komencis eldoni sub la titolo Studoj verketojn, kies celo estas la akcelo de la kulturaj kaj sciencaj interŝanĝoj helpe de esperanto. En 1973 aperis la tri unuaj kajeroj: Bibliografio de la publikaĵoj de Reinhard Haupenthal; eseo de Henti Vatré pri la socia romano en esperanto kaj reprodukto de leteroj de Lanti, kiuj troviĝas en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds kun komentarioj de Pierre Hirsch.

A.- La entrepreno tuj montriĝis sukcesplena. La kajeroj bone vendiĝis kaj la redakcio ricevis publikigindajn manuskriptojn. Kultura Centro Esperantista tamen ĉesis eldoni novajn kajerojn dum proksimume tri jaroj. Tiun ĉi paŭzon klarigas antaŭ ĉio la instalado mem de Kultura Centro Esperantista en aĉetotajn domojn, kiujn oni devis mebli, kaj ankaŭ la konstanta kreskado de la plenumata laboro. La sekretario mem de la Centro ne povis plu okupiĝi pri la eldonado de la kajeroj de la kolekto Studoj.

Cl.- En la pasinta jaro sinjoro Tazio Carlevaro, unu el la verkintoj de la enciklopedio Esperanto en Perspektivo, kiu loĝas tute proksime de la urbo La Chaux-de-Fonds, en la vilaĝo Les Hauts-Geneveys, sin proponis por transpreni la eldon-respondecon. Kultura Centro Esperantista ne estus povinta trovi pli taŭgan kaj kompetentan kaj laboreman helpanton.

A.- Ekde la printempo de la jaro 1976-a Tazio Carlevaro komencis la laboron. Li mem tajpis la plimulton de la stenciloj necesaj al la multobligado de la kajeroj, kaj por tiu ĉi multobligata laboro lin helpadis lia edzino sinjorino Teresita Carlevaro. Kaj komencis renaskiĝi la kolekto.

Cl.- Nun estas proponataj en la libromerkato 5 novaj kajeroj, kiujn ni hodiaŭ rapide prezentas, kaj kiujn ni pli detale priskribos dum la kvin venontaj elsendoj. Jen iliaj titoloj :

A.- Sub la titolo 'Raymond Schwartz, lia vivo kaj verkaro' la 4-a kajero publikigis prelegon, kiun sinjoro Roger Bernard, la sekretario de la Akademio de Esperanto, prezentis okaze de Kultura Semajnfino en Renens apud Lausanne, en la jaro 1974-a. Tiu ĉi 22-paĝa broŝuro interese la ŝatantojn de la ŝvarca verkaro.

Cl.- Sinjoro Tazio Carlevaro mem verkis Eseon pri Idio kiel 5-an kajeron, kaj tiu ĉi 50-paĝa objektiva studo bonege vendiĝas, pruvante, ke en la nuna esperatistaro troviĝas multaj personoj, kiuj ŝatus pli bone kompreni la idistan fenomenon.

A.- La kajero 6-a kaj 7-a estas nun presataj. Ni raportos pri ili, kiam ili estos aĉeteblaj. La 8-a kajero estas respondo de doktoro István Szerdahelyi, esperanto-instruisto en la Teknika Universitato de Budapeŝto, al la dana lingvisto Spang Hanssen, kiu asertis en artikolo, ke esperanto ne estas vera lingvo. Tiu ĉi lingvosciencia respondo formale kaj historie ricevis la titolon 'Jes, Esperanto estas vera lingvo !', respondo al Spang Hanssen.

Cl.- La 9-a kajero ne jam naskiĝis kaj la 10-a eldoniĝis en kunlaboro de Literatura Foiro kaj Kultura Centro Esperantista. Ankaŭ temas pri verketo de doktoro István Szerdahelyi. Titolo: 'Vorto kaj vortelemento en Esperanto'. En tiu ĉi broŝuro 16-paĝa doktoro Szerdahelyi prezentas sian vidpunkton pri la esperanta vortformado.

A.- La 11-a kajero estas franclingva resumo de tre grava verko baldaŭ aperonta en Esperanto. Temas pri komparo inter Esperanto kaj Interlingua. Verkis ambaŭ eseojn sviso, kiu bone konas ambaŭ lingvojn kaj kiu sin pseŭdonime prezentas sub la nomo Edo Bernasconi. Aktive kunlaboris al la eldono de tiu ĉi kajero la komisiono Esperanto en la Lernejojn de Kultura Centro Esperantista, ĉar en Svislando ofta argumento kontraŭesperanta baziĝas sur la aserto, ke eble Interlingua estas pli taŭga lingvo ol Esperanto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*